Ban Ki-moon akceptas la kuban ministron pri eksteraj rilatoj.

La ĝenerala sekretario de UN, Ban Ki-moon akceptis la kuban ministron pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez Parrilla, kiu gvidas la delegitaron partoprenontan la altan segmenton de la 69-a laborperiodo de la Ĝenerala Asembleo, kiu eksesios la 24-an de septembro.
Ban Ki-moon ree dankis la decidan respondon de Kubo por alfronti la epidemion de ebolo kaj petis transdoni sian dankemon al la kuba prezidento Raúl Castro.
Li emfazis la bezonon pri kunlaboro flanke de ĉiuj landoj kaj esprimis ke aliaj devas sekvi la ekzemplon de Kubo.